

Speciala  
numero  
de nia  
ĉina  
verkisto  
Mao Zifu



# Fonto

N-ro 280  
Aprilo 2004  
Jaro 24  
Volumo 24

## AMA CIKLO:

- 3 Librobreto
- 5 Televidilo
- 6 Horloĝo
- 7 Lito
- 8 Skanilo
- 9 Presilo
- 10 Pordo
- 11 Muro
- 12 Komputilo
- 14 Klimatizilo
- 15 Fenestro
- 17 Telefono

## AMAJ RAKONTOJ:


- 18 Ho, Amy
- 24 Du knabinoj neforgeseblaj

Mao Zifu

# I. AMA CIKLO




# Librobreto



la historio kuŝas inter hodiaŭaj bretoj.  
la tempo ne kapablas viŝi hieraŭajn voĉojn.  
vi dormas kune kun mi en la nigro.  
tereroj premas nin al fosilio.  
gluita sur papero juno restas ĉiam juna.  
la pozon kaj distancon araneo primezuras kun ĵaluzo.  
sinkronaj spiroj sublimiĝas tra la silkoj,  
efloreskigis reston de la edzo englutita.  
ni ankaŭ amis sed ne min vi voris.  
nur bedaŭrinde, ni jam ambaŭ perdis senson.  
pentradas miaj fingroj ploron sur glimeta frunto via;  
aŭdeblas ridoj kvazaŭ de metalo.  
ne devas loĝi ni en libro.  
kvankam nin akompanas reĝoj kun la kromedzinoj,

sufoka estas cirkonstanco.  
en ĉi plena majo,  
ni havas rajton nur spektadi kun okulvitroj.  
kiu diraĉas, la sekundo estas ja sufiĉa?!  
mi ĉasu la eternon en ŝanĝado!  
preferus mi viraraneon kaj ricevis idojn ĉe la kazo;  
la karno kaj spirito vivas  
en via ventro for de la kaduka librobreto.

## Televizio



spite al ajna vesto sale alloga estas sino la humida.  
pulsaj montaro kaj valego tenas papiliojn.  
inter la nigra akvofalo estas steloj flagraj.  
sonoroj el mielo kunportantaj rozolimbojn  
tentas orelojn de leporo.  
kvietaj aŭ movadaj tiuj kurboj  
ĉiam koloras vibrajn fenestrokurtenojn.  
fajro kaj rosetoj kreskas danke al la ŝanĝo.

vetero ekster miaj manoj.  
via vizaĝo regas la temperaturon de la planto.  
nesensiveco gajnas implusiĝon.  
formikoj rampas tra la sango;  
pufiĝaj kruroj provas serĉi landon.  
kurejo glata plenas de la neĝo.  
vagantaj fingroj trovas pafilegon.  
soifo pereiga elteneblas krevon.  
la fonto ŝprucas al ĉielo.  
lago atendanta nur ricevas sablon.  
vana kamparo rikoltigas herbojn.  
malsata ĉevalo kuras sur la monto virga.  
nenie troviĝas puto.  
la esploranto fosas sian nazon.  
fluido ne renkontas la havenon varman.  
flokaj de neĝoj sur la ŝvita sceno;  
susuras pluvo ekster la ekrano.

## Horloĝo




tik tak tiktako.

spite mi iras la rondeton  
sen spuro sur la tempa sablo.  
mankas lampturo, min kunulas la lampiroj.  
gravito de la dekdu bidoj de budao  
allogas miajn krurojn.  
murmuro hardas la liparon platan.  
la palaj vortoj el korprofundo  
estas vokoj de skeletoj ŝtalaj.  
senforma skemo ja rekordas  
dilemon de vivanto kaj mortanto.  
kiu volontas malavare meti sian fingron  
sur la butonon? la stentoro dancos kiel leopardo.  
teatro unuopa prezentiĝas milojn da jarcentoj;  
spektanto nur troviĝas en spegulo ĉe dorsflanko.  
mi volas apreceti mian ludojn,  
ve, korpturniĝi ne kapablas.  
mankas oleo la lubrika;  
fereska spino ja sopiras pri tuŝado.  
streĉita kordo nun atendas nutron.  
via laktujo povas vekti dorman evereston.


## Lito

kun lito sur la dorso  
mi iras ĉirkaŭ la terglobo.  
putris la pugo pro la pezo netenebla.  
la lito ankaŭ seĝo, tablo, necesejo. . .  
sur ĝi milito ne okazas;  
fabriki homojn estas ekster mia povo.



hazardaj luktoj, la rivalo nur sukubo.  
kiu volontas sur ostaro suĉas sekiĝan langon?  
vidindoj sur ekrano logas voston kalcimankan.  
bovino paŝtas sin en korto de budao.  
la melkistino for de la budeto  
pufegigas sian bruston.  
oni kopias ŝafojn jam nebezonte amon.  
do senlabora mi ekstudas plantojn.  
mimozon gravedigas vermo;  
rododendro estas ne kukolo.  
semoj vojaĝis en la spacoŝipo;  
sezamo iĝas melonego.  
planta somato ŝvebas kun la lito tra senhoma kosmo,  
kiam fariĝos besto tre fekunda?

**Skaniilo**



rezervas viajn ombrojn en la koro,  
mi tute ne memoras viajn kantojn.  
kakofonioj pulsas tra la brikoj.  
svingante sveltan manon vi veturis al lontano.  
aŭtomobilo estis kunportita,  
la vojon kotan mi solulo iras per piedo.  
vento forblovis lunon kaj la stelaron,  
ĉiaman tagon mi ne povas fini songon.  
sen sango kaj spirito  
mi lekas karnon kaj skeleton.  
flikeblas haŭto kaj fasono,  
sed ne la koron kun abismo.  
larmoj vizaĝon de polvoj povas lavi  
ne revivigi vian emocion velkan.

metu ĉielon post la dorso.  
ĉu vi fariĝos nubo kaj flugos al la ĉambro griza?



# Presilo



sorto superas miajn manojn.  
blanka aŭ nigra estas en la cerbo.  
riproĉo, puno venas de kaprico.  
la falsaj iam trovas sin en koro mia.


krudaj, ellaboritaj trudas sin tra la kanalo.  
akcepto restas devo nura.  
najlita sur la tablo, sen impulso,  
nenia antaŭstreĉo, nek aŭguro nek varmiĝo.

diboĉa ĝuas vi en koloro;  
virusan nigron mi ricevas danke al la fingro pika.  
vizaĝoj sukaj ĉirkaŭ vi vagadas en tagnokto,  
tamen min preteriras fulme.

beleco kaj prospero, la honoro de la majstro.  
fuŝaĵo, krimo mia.  
juneco venas en la ĉelo;  
mi estas forĵetota kiel superfluo.

min kisadas muŝoj, ratoj.  
hokĉifonisto al mi kuras kun la mano ankra.  
spite al la ŝrumpega brusto  
mi trovas la havenon sen cunamo kaj meteorŝtono.

## Pordo



trans senforma pordo  
vi vin mem vestas per nenio.  
cis ligna pordo  
oni vin vestas per fero kaj cemento.  
vi restas mia idealkastelo.

kandeloj lumas sunon,  
vi nuda dancas sur pentraĵo.  
en vato mi la varmon sentas;  
rigardo tuŝas la lanugon.


amoro ja ne decas en kastelo.  
fabriku bebojn ekster pordo el papero!

ekster la pordo,  
kandeloj estas superfluaj.  
neonaj lampoj brilas la ĉielon.  
senvestaj gejunuloj tentas la rigardojn ardajn.  
oroj inkrustas iliajn umbilikojn fore de la zipo.  
floroj kaj rubandoj kuŝas ĉirkaŭ la hararo.

graveda edzineto ies frapas je la pordo.  
neatendita la spektanto venas ree sen bileto.

## Muro

danke al muro,  
mi ĝuas nigron kontraŭ vento kaj pluveto.  
mia malico kreskas sub la planko.  
danke al muro,  
oni min nudan imagas tigro kun kolora ŝelo.



danke al muro,  
mi gajnas protekston kontraŭ ŝtelo.  
polpaj la manoj serĉas en la pantalono.  
danke al muro,  
ŝi konsideras min ŝafo frigida.

la muro baras glavon.  
misiloj flugas tra la densa nigro.  
la muro baras haŭton.  
sensaĵo reakcias sub la ŝtofo plumpentrita.

ekster la muro,  
piratoj ŝtelas virgajn montojn.  
ene de la muraro,  
ŝlemilo flegas ĉinan rozon per spirita suko.

la muro el papero

ne povas baras fingrojn.  
salivo de juneco  
detruas vestojn el oleo kruda.

## Komputilo



ebena la brustkorbo; sen rideto sen plorego.  
antaŭ vi la rigardo serĉas montojn kaj riverojn.  
ekster fenestro estas nuboj kaj pluvego;  
en la manaro nur troviĝas muso muŝo.  
kiso kaj tuŝado trans la vitro;  
fingroj trovitaj sub literoj.

floso, flosado kaj plugado, plugo.  
floroj plukitaj flirtas tra la okulparo daltonisma.  
trunko la velka ne posedas tentan lumon.  
amikoj infanecaj havis siajn paŝtatarojn;  
mia ŝafaro trovas sin en puto.

enorma la enhavo, fulma la rapido.  
alvenas buŝoj kaj oreloj, eĉ varmetaj koroj kun tri  
dimensiaj.  
plumoj, paperoj, filmoj, kaj laseroj. . .  
konsilo kaj konsolo ja plenigas la botelon.  
hidrarga korpo sentas la sezonojn;  
la kapo flugas ekster la aero.  
kolora la songado, freŝa la gustumo.  
floroj el neĝo aŭ majverdo ŝtopas la ĉambreton.  
muzikoj, dancoj sur la vitro flagra.

la lango sang-avida flaras rozojn.  
la ruĝo glimas kiel allogilo.  
al ĝi mi ĵetas pilkon giran laŭ orbito;  
la nokta papilio volas fali en la fajron.  
la suno!  
kia la suno vaporigas min al eterna stelo ĉirkaŭ la kurbo!  
la blua maro skuas la kadukan en la infanecon.  
flosa flosado. ŝafoj kreskas sur montaro.

tablotennisus la terglobo!  
paŝilo ne kapablas trafi birdon la ĉiumonate ruĝan.

## Klimatizilo

julia vento.  
decembra suno.  
sama vizaĝo restas tra la tempaj paŝoj.



inter majo kaj aŭtuno estas galaksio.  
amo platona provas magnetecon.  
purpura suko fluas sur la tero;  
melkita semo birdas super la tegmento.  
radioj renkontiĝas disde lipoj;  
manoj ligiĝas kun mufgantoj.  
tajdado dankas al la luno ronda.  
la langoj etenditaj intergustas sur la foto.  
du steloj el la suda kaj la norda respektive,  
la samaj sangogrupoj ondas en riveroj propraj.

per via korpovarmo ĉiam revas fridigito  
sin degeligas el rigido,  
kvankam vi kuŝas for de miaj brakoj.  
fajrero de alumeto  
estas sufiĉa ja sentigi  
al etiola okulparo sunon.  
ĉiam resonĝas marto antaŭtempe morta per la lipoj  
trovi fekundan oraŭtunon.

guto da roso  
povas vigligi velkan koron.

kreskigas muskon sur la ŝuoj larmo via ĉe disiĝa tempo.  
nenie trovas sin sur mia ventro spuroj de la ungoj rozaj.

foriris vi en majo kun tepida haŭto.  
kial do lasi en la ĉelo la litaĵon, jupkulotojn?

## feneŝtro

Ele de kadroj grupoj da formikoj  
interparolas pri vetero, translokante revon kaj rikolto.  
mia manparo pendas nepovante kapti  
montrilon la sekundan. iluzioj vibras inter brikoj.



verdaj branĉetoj svingas sin, al mi vokante.  
kvankam kun miloj da sed jam rompitaĵoj kruroj  
la skolopendro restas en enmova pozo.



gapo. rigardo en nebulo. la okuloj atendantas frapon de folioj.  
vento faligis la kurtenon.  
nur aŭdeblas birdaj voĉoj.  
kompata besto, kion nun vi volas diri al mi?  
kio okazas trans la ŝtofo?  
lacerto traas la fendon esplorante mian ĉelon;  
scivolas ĉu la nigro nigras en la tago.  
jes, la sunbrilo ĉiam foras de mi je lumjaroj.  
aŭskultas mi la pluvon.  
la lampon rompis tondro.  
jes, la nokto regas grizajn murojn en tagmezo.  
kaduka la ĉambro, sed ja ĝi ne trapikeblas de la fulmo.  
aspiras pluvon nur la buŝo tamen ne oreloj.  
kiam alvenas sismo kaj detruu la brikaron?  
mi volas iĝi la fenikso el tereroj,  
aŭ eĉ formiko kiu povas porti sian revon de lokalo al lokalo.

## Telefono

voĉo kun flagroj venas ekster vido.  
rigida korpo sentas eston festan.  
iam vizaĝo-ĉe-vizaĝe ni ne havis buŝon,  
nun miloj da riveroj ne kapablas bari niajn manojn.



la haro ligas al ni la lipojn;  
viglas la elektrono tra la dentoj.  
en nubo ekaperas ŝvito. la glataĵo.  
la manoj vagas sur la kurbo ruĝa, trema, varma.  
la fingroj plukas la fadenon longatempe velkan.  
balonoj sur la brusto; tondroj en la koro.  
miela lafo ondas tra la tubo.  
mortis hieraŭ; morgaŭ eble ne venos.  
ombroj foriris kun la vento,  
sed sableroj loĝas en la okulparo.  
etaj karesoj impulsigas akvon.

ŝtormo pecigis la linion.  
la voĉo flosas en rigardo.  
buŝojn ni havas, sed sen manoj.  
sur la ĉielo fajro, tamen inter ni glacio.  
lipo-ĉe-lipe gusto ŝtona, fera kaj hidrarga.  
la dentoj fortaj ne kapablas teni la grizetan haron.  
al la balonoj mankas gaso.  
sekiĝis jam la puto kaj kadukis jam la tubo.

voĉo kun flagroj venas ekster vido.  
rigida korpo sentas eston festan.  
vizaĝo-ĉe-vizaĝe ni ja havas buŝon. . .  
la luno super lito; kaj ĉi luno en kovrilo.  
kie troviĝas la piedoj, manoj, haroj, lipoj, varmo?

## III. AMAJ RAKONTOJ

### Ho Amy

Amy, kial vi min vizitis ankoraŭ? por venĝi?

Ĉifoje, mi min montris iom entuziasma. Jes ja, oni diris, ke vi jam trovis vian rezulton. Tio pli-malpli estas por mi konsolo kaj eskapo. Vi edziniĝis kaj patriniĝis!

Kiel antaŭe, vi estis parolema, sidante en mia rulseĝo ĉe la lito, sur kiu mi estis kuŝanta; vi, demandinte pri mia fartstato, babiladis pri la eksterloka hejmo, via naiva aminda filo 3jara, plimulte pri via geedzeco.

Malkaŝe, vi rakontis al mi: Via edzo estas belaspekta, altstatura kaj ne malriĉa, eĉ kapabla en multaj aferoj. Sed li verŝajne ŝatas tele-geedzecon; li ne volas transloki kaj translaborigi vin ĉe sin; li estas trompema — ofte antaŭ vi li taksas, ke virino grasa estas seksalloga, kaj iutage vi trafis, ke li kuŝas kun grasulino en via ĉambro!

"Antaŭ geedziĝo vi ne komprenis lin?" Mi nereteneble trudrompis vin. Senĝena vi daŭrigis:

"Mi konis lin en svatanonco sur gazeto. Nun mi ekscias, ke li jam ne estis fraŭlo, kiam li edziĝis al mi; li estis divorca. "

"Kial vi kredis svatanoncon kaj senkonsidere urĝe edziniĝis al li, malproksima eksterprovincano?" Riproĉis mi amzorga.

"Pro vi ! "

Subite ekmovante la rulseĝon, al mi vi vin turnis. La frazo

sonis kvazaŭ magia tondro el feina interdento. Okjaron paraliziĝa mi preskaŭ sidiĝis de sur la lito.

Anstataŭ al miaj surprizitaj okuloj, vi fiksis vian flamiĝan rigardon sur la verda lankovrilo sur mi. Mediton vi dronis. Mia ĉelo fariĝis morte kvieta. . . Aŭtunaj folioj susuris ekster la fenestro. Arda sango murmuris en mia sensensiviĝinta korpo, mi ekaŭdis vian korbatadon, unuafoje.

Jes ja, Amy, nia konatiĝo centpercente ne estas hazarda.

En la baka julio de 1984, ĵus diplomiĝinte el universitato mi aliris al la lernejo en Ĉ-urbo, kie mi instruos, tiam ni renkontiĝis, kiam mi venis de la provincurbo kaj vojperdis post elbusiĝo. Estas vi, bonkora, kiu min kondukis al la lernejo, en kiu via bofrato laboris. Via fervoro estis komforte friska.

Plie, mia domo estis aranĝita ĝuste apud tiu de via bofrato; ili en unu korto. Krome, via fabriko kaj mia lernejo situas najbare. Preskaŭ ĉiutage mi vin vidis. De *Would you please open the door?* ĝis *Hi! Open the door!* ni fariĝis geamikoj sen ceremoniemo. *See you!* matene dirita realiĝis vespere. Danke al via babilkapablo, mi komprenis, ke vi ne estas sensciulino; al vi Shakespeare, Baudelaire. . . ne fremdaj.

Neatendite, iutage vi alvenis al mia ĉambro, portante diktafonon kaj librojn pri Esperanto, kiun antaŭe mi konis nur laŭ onidiro! Spite al mia konsento aŭ ne, vi min alparolis, ke vi prenu mian domon por lerni; via loĝdomo estas tro fuŝa — unu knabino egalas al 5000 anasoj kaj 1000 simioj, en via ĉelo loĝas 8 knabinoj. . . Ho, de kiu vi sciis, ke, ĝis tiam, mi ne havis amatinon? Ĉu vi juĝis per tio, ke en mia albumo ne troviĝis gepara foto? Al via arbitreco mi montriĝis rezignacia, ĉu? Eble, iam mi pretervole elparolis: aminda estas knabino buba knabeska, ĉu ne?

Vizitante la korespondan Esperanto-kurson de E-urbo, vi fariĝis mia unua Esperanto-instruistino. Vin mirigis ke mi memoras la vortojn pli rapide ol vi. Fakte, en la angla lingvo mi ege vin superis.

La konduto hamleta de mi vin afliktis. Neniam mi, animalo malvarmsanga kiel vi priskribis, tuŝis vian manon, ne parolante pri la larĝa sekstenta buŝo (ekskuzu min, sed oni tiel laŭdas tiun de usona stelulino). Intertempe min eltrovis studentino, kiu efektive estis mia samklasanino en mezgrada lernejo. Ŝi eniris kolegion dujaron-post mia sukceso ĉe la ŝtatekzameno por altlernejo. Ĉe rekono mi ekamis ŝin, kvankam mi ne konis ŝian penson. Do, tagon post tago mia konduto iĝis pli frosta al vi.

Ĉiu afero ne povas pretergliti viajn okulojn. Insiste vi opiniis: Sen bohemio, sen la "Floroj de l' Malbono". Sed ja mia kontaktado kun la studentino vin ĉagrenis. Vi estas diskreta kaj konvinkiĝis, mi ne estas diboĉa. Kaŝe vi penis por juste konkursi kun ŝi.

En tiu vintra ferio, mi iris al mia naskiĝloko, dum vi uzis mian ĉambron sola, tagnokte. Kiam mi revenis, vidiĝis sur la skribotablo: glaspleno da lakto, via foto kadrita, papereto, sur kiu legiĝis:

*Kara,*

*Mi devas iri al H-urbo por akcepti la trejnon de parola lingvo duonmonaton. Kiam vi revenas, nepre mi forestos kaj, la lakto fariĝos glacio kiel via koro, tamen mi estas certa, ke ĝi restas pura, sub mia rigardo.*

Via Amy

Dum la trejnado, je via propra elspezo (tiutempe tio ankoraŭ ne tre furoris en Ĉinio!), vi enskribiĝis en universitaton por progrese lerni Esperanton.

Forlasinte vian laboron, vi alveturis Y-provincon for de via hejmo.

Kun kia korstato vi foriris! Fruprintempo. En la nokto antaŭ via ekvoĵiro, mi redonis al vi la surtuton, kiun vi donacis al mi en la pasinta vintro. Tiam vi ploris intense, ŝtona mi tamen persistis forpuŝi vian fajran sinon kaj preferis frostan venton. Pluvo. Pluvo kiel via larmo! Mi akompanis vin nur ĝis la pordego de mia lernejo. Meznokte. Kiel senkora estis mi!

La sekvan tagon, ĉe surtraĵniĝo vi tenis forte mian manon, tre sopirante povi min tiri sur la trajnon.

Kiu informis vin, ke min trafikakcidento trafis? Mezprintempo. Rezigninte vian studon vi reflugis al Ĉ-urbo.

En la hospitalo vi min flegis diurne. Kiel patrino banas sian bebon vi lavis al mi la korpon. Vi tondis miajn ungojn kaj kisis mian manon kun larmoj. Tion flegistino malkaŝis, kiam mi vekigis. Kaj vi kaptis ŝancon al mi rekomendi pri Kalocsay, Waringhien, Auld. . . lufoje, elvekiĝinte el somnolo, vi rimarkis al mi, ke vi vivsekiis min por kontroli mian koron - kia ruĝo kaj varmo! Ĉu vere?

Poste, mi revenis la lernejon kuŝante. Mi neniam povos restari, mi perceptis. Se mi daŭre ricevas vian zorgon kaj amon, la platona tretos vian junecon! Malakcepti, mi devas. Sekve de tio, mi ĉiam pretekstis dormon por rifuzi vian vizitadon. Venis kaj revenis vi malgraŭ mia sekeco dum la tuta somero, kiam mi "dormadas". Aŭtuno venis. Vi aĉetis por mi la lankovrilon. Ne ricevinte mian dankon vi forkuris kun la aŭtuna vento.

Unu jaro pasis. Marte de 1986, mi loĝis en la hospitalo de HN-provinco. Kie vi estis?

Disiĝe de vi, ofte mi rememoris tiujn tagojn, en kiuj vi min prizorgis en la hospitalo de Ĉ-urbo. Estas ja unuafoje, ke

printempo sentigis sian tenton al mi, ekde mia naskiĝo. La arbo ekster la fenestro de kuracejo min prisorĉis per siaj verdaj folioj. Nur folioj? Siatempe, sur lito mi kuŝis kun la kranio tiritita per peza plumboglobo kaj por mi estis neeble korpoturni, tamen mi de tempo al tempo volis flankiĝi kontraŭ la fenestro por ke mi aprezu la verdon. Zorgeme vi min pripoziciadis kune kun flegistino. Ho ve, antaŭe en floroj mi ne atentis pompon.

"Sep jarojn! neniam mi ne strebis vin forgesi," vi eksubdiris, prenante la angulon de la lankovrilo, kvazaŭ rememorinte ion, danke al cerbumado longatempa. "Mi vin tedis! Mi konstatis, ke vi estas libromaniulo. Vi ne kapablas ne akcepti libron kiun sendis eĉ murdinto de via patro. Kial vi malakceptis miajn Esperanto-librojn?"

"Kio?"

"Sciinte ke vi aliris al la provinc-urba hospitalo, mi senprokraste sendis al vi vortaron kaj librojn kaj revuojn, sed oni ilin resendis. Kial?"

"Kial? Ankaŭ mi ne scias."

"Nun ke paraliziĝulo ne min bezonas, kiel fari? . . . Eskapi! Pro la svatanonco mi atingis J-provincon. Ne plu vin vidi, mi ĵuris. Post kiam mia edzaĉa trompado malsekretiĝis, mi revenis jam kelkajn jarojn. Cetere nun mi suferas je nefrito".

"Kial vi ne faris viziton ĉe mi post via reveno?"

"Pro posttimo! "

"Ĝus mi bonvenigis vin indifere?"

"Kompreneble ne! Ĉar mi jam edziniĝis. "

"Amy, ne tiel diru, mi petas. Pardonu. . . Vi restas ankoraŭ tiom graci-kreska kaj junaĝa kaj. . . "

"Por la filo, mi portempe ne decidis lin reeksedzigi. "Vi respondis obtuze, puŝante la rulsegon, kaj turnis vian nebulan

rigardon al la fenestro.

Vesperiĝis.

"Aĥ, tiuj libroj. "

"Nu, mi ilin kunportis ĉe vin. "

Ho, Amy! Vi mallernis Esperanton, sed malamas min ĝisoste!

[aperis en Monato, 1994, n-ro 12]

## Du knabinoj neforgeseblaj

Maje de 1998, mi ekhavis komputilon. Antaŭaj manuskriptoj devis esti enkomputiligataj.

La aferon plenumi du lernejaninoj volontis helpi min. Krom ilia bonkoreco, efektive ili povis pli bone ekzerci sin pri komputilo. Kompreneble kun ega plezuro mi akceptis ilian ideon.

Kaptante kiajn ajn ŝancojn ili venis ĉe mi aŭ duope aŭ unuope. Post nelonge, ili kaj mi fariĝis familiaraj. Kaj ili ankaŭ iom flegis min je rutina vivo, kiun tiam nur mia patrino pli ol 70jara prizorgis. Reciprokante ilian favoron, al ili mi instruis la anglan lingvon kiun la lernejaninoj devigite studas, kaj iom da Esperanto, pri kiu ili sciemis de tempo al tempo. Plie, la sciemo intensiĝis, post kiam ili konis ke "tablo" preskaŭ egalas al la angla "table", kaj "literaturo", "literature"; "kisi", "kiss"; "amoro", "amour" ktp.

Tiam mi ne povis sidi tutan tagon, plejparte do mi kuŝis sur la lito kiam ili komputilumis. La komputilo ĝuste estis ĉe mia lito. Nenia ĝeno. Ili restis en mia ĉambreto ĉu unu- aŭ du-ope, ĉu tage aŭ vespere, eĉ iam nokte. Tamen, tio tute ne decas, se



mi estus instruisto sana. La eduka regularo difinas: nesamseksaj instruisto kaj instruato ne estas permesataj kune resti nur duope en oficejo kun la pordo fermita kaj en privata dormoĉambro. Escepto estis mi kiu ne povis stari el la rulseĝo kaj memŝanĝi la kuŝon sur la lito. Unuvorte, nepovado atenci iun ajn.

Iutage, la pli nealta knabino alvenis sole. Tiam mi estis sur la lito fronte al muro, kaj legis libron. Kiel ofte ŝi tajpis spite. post mia dorso. Iu vorto sur la manuskripto ne tiom klaris. “velupteco” aŭ “volupteco”? Mi certigis “volupteco”.

“Kia senco?” ŝi demandis.

“Eh. . .” mi ne volis klarigi.

“Forgesis?”

“Ne. ”

“Kial do ne respondi?”

. . .

Malkaŝema ŝi subite prenis la vortaron antaŭ ĉe mia vizaĝo. Tuje ŝi trovis la vorton kaj komprenis kial mi ne volis glosi.

Ŝi ridetis.

Neatendite, ŝi kisis al mia vango! Kiam ŝi redonis al mi la vortaron. Kaj ŝi forte faligis sin sur mia brako. Ĉe la tuŝo mi eksentis molaĵon sur ŝia brusto. Kia sekundo! Tion 35jara mi neniam spertis. Ververe! Feliĉe, tiam mi kuŝis surunuflanke kaj kun la dorso al ŝi. Alie. . . kio okazos, mi ne sciis.

Fulme ŝi foriris al la klasĉambro.

Post du tagoj. Ankaŭ ŝi knabeska venis sola post vizitado de stratoj. Enirinte, ŝi fermis la pordon kaj arbitre funkciigis la klimatizilon. Iam ŝi malbutonis sian taliveston kaj iam levis la jupon supren. Kvazaŭ en la ĉelo ne troviĝis vira mi ĉifoje kun la vizaĝo fronte al ŝi.

Honta mi translokis la rigardon ekster la fenestro. Ho, la

kurteno restis malfermita. Aperis gvatantaj okuloj el fenestro sur la kontraŭa domo distanca de nur 20 metroj! Kia konsterno!

“Atentu, knabineto! Iuj ŝtele rigardis vin. ” Kolere mi muĝetis al ŝi.

Senprokraste ŝi fermis la kurtenon, kaj rebutonis la veŝton.

Ĉar ŝi estis pli juna ol mi je 16 jaroj, ŝi kondukis antaŭ mi filino. Tamen mi devis persvadi ŝin agi pli dece.

Sekvantajn tagojn, geviroj vizitis min pli ofte ol kutime. Flareblis ke ili konis la scenon. Fervoraj el ili konsilis ke mi priatentu la moralon. Ho ve, ŝi kisis al mi la vangon! Se la buŝon, ŝi malvirgigus min aŭ mi ŝin.

Tiu ĉi knabineto ne tiom aŭdacis poste. Danke al la fervoraj, en sonĝoj mi rifuzis katinon kiu rampis sur mian korpon kaj intencis perforti min.

Pri la relative alta knabino pli juna ol mi je 18 jaroj. Ŝi estis introverta. Verŝajne, naiva ŝi ne sciis la skandalon.

Por plibone pasigi ekzamenon, ŝi alvenis post la vesperleciono ĉiutage ekde junio. Krome al ŝi mi lernigis matematikon. Estis ĉirkaŭ je la deka de nokto. Pasis kelkaj tagoj. Ĉio en ordo.

Ĉiufoje kiam ŝi venis, mi apogis min sur la lito. Paperoj en miaj manoj, kiujn mi pretigis dum tago. Ŝi staris aŭ sidis ĉe mia kapo apud la lito. De tempo al tempo ŝi kapjesis aŭ skribis. Teda estis la pozo por mi ankaŭ por ŝi. Do iam miaj brakoj bezonis moviĝi. Tre prudente moviĝetu – kiam ŝi ne povis ne sinkline proksimiĝi al mi por klare vidi literojn sur la papero, la adolta ĉebrusto petole disetenadis la du faldojn ĉe la butonlinio de la ĉemizeto; iom videblis la mamzono plej ena. La movetado de miaj brakoj devis pleje teniĝi racia.

Duonmonaton poste. La lacegaj brakoj senkonscie renkontiĝis kun la plena brusto. Timida ŝi malantaŭen paŝetis. La instruado daŭris. Kiam ŝi fari noton, mi ekvidis ke krom la ĉambreto en kiu ni studis, malhela estis la salono, kaj ke la patrino jam dormis. Tra la fenestro de la salono kaj la ĉiam malfermita pordo de la ĉambreto oni povis vidi ĉion kion ni faris dume.

Konsciinte ion fuŝan, mi al ŝi flustris:

“Fratineto, ŝaltu ankaŭ la lampon en la salono.”

“Kial?”

“Ni bezonas pli da lumo.”

Ŝi ŝaltis la lampon kaj reiris kurante, serioze.”

En sekvantaj tagoj ni studis kun la du lampoj ŝaltitaj.

Dimanĉe. La alta ĉe mi, nur ni du. Matenon. La sunlumo radiis tra la fenestro de la ĉelo. Antaŭ ĝi ŝi kaj mi sidis ŝultron ĉe ŝultro. La kurteno leviĝis alte. Ridante, ni provis verkojn en la komputilo, manĝante pomojn. Kutime mi malstreĉis la talion de momento al momento dumane premante la puŝringojn de la rulseĝo. Ekster volo mia mano kontaktis ŝian femuron.

“Pardonon,” mi elparolis konsternita.

“Vi volus preni mian kuloton kiel tukon? Laŭplaĉe,” esprimis ŝi kun grimaco.

Danke al ŝia humuro la akcidento facile pasis. Parolante, prizorgema ŝi prenis tukon kaj forviŝis la pomsukon de mia mano. La mieno, kiel pliaĝa fratino al sia frateto.

Tre laciga estis la provado. Por ripozi, ni serĉis muzikodiskojn. Tiam mi posedis preskaŭ neniun. Ŝi ekpromendis en la salono. Subite mi memoris ke la patrino akiris du diskajn el rubujo hieraŭ. Ŝin mi alvokis kaj montris al ŝi la diskajn kiuj restis malpuraj. Kun ĝojo ŝi ilin purigis kaj

enmetis unu el ili en la diskilon de la komputilo. Be! Sur la ekrano aperis kantistino kun grandaj mamoj kaj travideblis klare la cicoj. Mi ordonis ŝin forĵeti ĝin tuje. La alia disko. Ha, plihontiga! Geviroj amoris freneze sur lito. Tujtuje ĵetu ĝin foren! Ruĝo de embaraso min silentigis longatempe. Al la ĉielo ĵureblas ke neniam mi estas perversa. Neniam povas forgesati la admono de instruisto en la normala universitato: kiel instruisto oni devu teni decan distancon al instruistinoj, neniel intenci ilian pudoron, neniel priteni ilin. . .

Kvazaŭ nenio okazus, kvieta ŝi pretigis tagmanĝon por ni.

La samtagan vesperon kaj sinsekve ŝi studis ĉe mi akompanate de alia knabino, kiu tamen sidis en la salono legante sian libron.

Pri kio la alta pensis? Ŝajnis ke ŝi estis tre matura ol la nealta. Verdire, mi pli ŝatis ŝin tiamanieran. Ŝi traktis min instruisto, amiko, frato. . .

Somera ferio. Ŝi akceptis specialan trejnon pri komputilo okazigitan de la lernejo, senpage pro sia elstaro en la ekzameno. Iom da tempo ŝi restis ĉe mi nur tagmeze aŭ vespere post leciono.

Tiun ĉi periodon, ŝia samklasanino lernis ĉe mi. La lasta knabino estis pli modernema, ĉiam kun altegaj ŝuoj kaj mallonga jupo, strikta sportvesteto senmanika. Pli ol la aliaj du ŝi fieris pri sia juneco maturknabina. Sendube, ni ofte sidis kune ĉe la komputilo kaj neeviteble mia mano renkontiĝis kun ŝia femuro. Tion eble iufoje la alta knabino vidis.

Ankoraŭ dimanĉe. La alta feris, sed la lasta ne.

Ili du en mia ĉelo. Mi kuŝis sur la lito pro malvarmumo, kompreneble fronte al la komputilo. La alta sidis ĉe la lito, kaj la lasta ekzercis sin ĉe la komputilo.

Babilado kaj ridoj. Neatendite, la alta etendis siajn krurojn sur la randon de la lito, preskaŭ sur mia nazo. Feliĉe, ŝi havis longan pantalonon. Volvante la pantalonon, ŝi ekprenis mian manon kaj masaĝis miajn fingrojn, fiksas mian brakon sur siaj kruroj. Tion la lasta ekvidis gape, tamen montris nenion. Spite, la alta knedis plue, mallaŭte parolis pri io kaj iu. Hontege, mi malantaŭentiradis mian manon sed ne povis sukcesi. Ĉi-okaze mi nur povis resti senvorta kaj false indiferenta. Ne la masaĝado sed la laktaj kruroj tiklis al mi la tutan korpon.

Pri kio ŝi pensis? Jes, la koron de knabino oni ne kapablas diveni.

Unu jaro fulme glitis. Ili disiris de la lernejo kaj laboris en aliaj urboj respektive.

Iam la nealta telefonis al mi ke ŝi edziniĝos baldaŭ. Ŝin mi gratulis elkore.

Iam kaj iam la alta telefonis aŭ invitis min partopreni babilejon en interreto.

Fojrefoje mi intencis alivestiĝi kaj kvazaŭ junulo samaĝa kiel ŝi interparolus pri amo, sed finfine mi rezignis tion fari. Ŝi eknomis min paĉjo.

Jes ja, mi devu esti ŝia paĉjo. Ŝia okulparo granda kaj brila estas ĝuste tiu de la filino mia pri kiu mi ofte songas.

Iun valentenan tagon. Ni renkontiĝis ree en la interreto.

Bonan valentenan tagon. Unue ŝi sendis la informon.

Same al vi. Kion nun vi faris? Mi respondis rutine.

Ĝui la feston.

Kun kiu?

Vi. Stultulo.

...

Verŝajne iu kune kun ŝi. Alie, ŝi ne aŭdacis diri flirtaĵon.

Ŝin mi plejbone komprenas.

Tiun nokton mi prisonĝis ke ŝi kaj mi ĉeestas la UK-on de Pekino en 2004, kune mantrenante knabineton de grandaj okuloj. La knabineto estas ŝia, mia, aŭ de ni ambaŭ?

## Unu Monato

Printempo revenas. Folietoj etendiĝas el arabaj ŝeloj; herbetoj staras el fendoj inter cementoĵoj... pro allogo de suno. Kaj mi, sidinte kaj kuŝinte la tutan vintron en la ĉambro, eksidas en la korteto ankaŭ pro la allogo de la suno, verdaĵo.

Varmeto. Ŝviteto. Do mallongigu la jam longegan hararon, ne por tenti kolorajn birdojn sur la arboj. Malriĉa razistino venas ĉe mia hejmo kaj mallongis mian hararon en la korteto sub la suno. Kiam ŝiaj fingroj tuŝas miajn lipojn, mi ne sentas guston de virina haŭto. Simpla ŝi ne posedas barbirejon, nur en la loĝejo de la bopatro iam razas al lernejanoj kiuj mallongigas sian hararon ne por kapti okulumon de knabinoj.

Malvarmumo. Varmego dum nokto. Piloloj, tablojdoj, pocioj... post tagoj veneniĝas la korpo. Ho, homo, kiel malforta! Hospitalo estas tro kostiga. Mi ricevas pogutigadon ĉe proksima kliniko. Kvartagon poste, ŝajne saniĝa mi manĝas pilolojn, tablojdojn... por ŝpari monon.

Varmego aŭ malvarmego tagnokte. Mi volas manĝi nenion. Kaĉo subtenas la vivon.

Pensoj. Neniu sonĝo. Restari. Morti. Saniĝi. Terskuo. Bombo... se ne trafi la paralizigan trafik-akcidenton! Edzino. Filino aŭ filo... sed nun min flegas la ĉirkaŭ 80jara patrino kaj

fratino.

Leteroj. Eksedziĝa virino pli juna ol mi je 10 jaroj sendas al mi preskaŭan amemon. Tiun mi facile flaras sur la vortoj, kvazam neniam mi scias kio estas amo. Ve, mi ne aŭdacas akcepti amon! Mi jam donis tro da malfaciloj al miaj patrinoj kaj fratinoj. Jes, mi aspiras pri amo kiel vi, sed vi povas stari, piediri, mankapti... ĉion mi ne povas. Vi ne plu amas perfektkorpan viron prizorgante ke li eble refoje forlasos vin, tamen kion mi povos doni al vi? Nur konsoloj aŭ konsiloj sufiĉas kontentigi vin? Vi volantas tagnokte resti ĉe mi? Vi neniam forlasos min?... mi ne kredas! Do jen la respondo:

Mi kompatas vian staton kaj admiras viajn kuraĝon kaj bonkoron. Via sterileco estas por mi tute negrava. Tamen mi kutimas sola kun komputilo. Amo por mi estas tro malproksima. Jes, vi estas prava pri mia situacio laŭ ĵurnalo. La patrino kaj fratino povas doni al mi amon sed tamen ne kromamaĵon! Jes, oni iam bezonas ion ekster amo; jes ja amoron. Sed tamen mi nieniel volas akcepti feliĉon kondiĉe ke vi ricevos malfeliĉon. Neniel! Mi ne estas granda homo; konscienco devigas min rifuzi vin.

Leteroj el interreto de esperantistoj. Gazetoj en nia lingvo spite al tio ke mi jam havas nenion ĉe la kasejo de UEA do ne povas reboni. Dankojn! La Gazeto, Lkk, Fonto, Literatura Foiro, Esperanto... Vivo restas kolora danke al Esperanto.

Virino, antaŭa esperantisto eĉ speciale studenta, vizitas min kaj volas refoje lernas esperanton por UK 2004 en Pekino aŭ la posta postlabora vivo. Ho jes, Esperanto restas utila.

Ankaŭ mi aspiras ke mi povus ĉeesti la UK-n en Pekino!

Raportisto el radiostacio intervjuas min pri Esperanto kaj afero de handikapuloj. Mi restas homo utila.

Amiko telefone sciigas al mi: li vidis informon ke oni povas restarigi paraliziĝulon en 3 jaroj! Ho, mi povos restari post 3 jaroj! ! Ne mortu hodiaŭ! ! !

Alia kliniko. Pogutigado aliajn kvar tagojn. Certe resaniĝo. Tajpado de ĉi peco.

[aperis en La Gazeto, 2002, n-ro 100]